PRO ESPERANTO.

Na námitky Marcela Prévosta odpovídá *Rudolf Fridrich*.

Před nedávnem napsal známý romanopisec a člen Akademie Marcel Prévost do pařížského »Figara« článek, jehož překlad aneb aspoň obsah otiskly četné denníky. Oceniti jeho vývody před českým čtenářstvem pokládám za svou povinnost, posílen jistotou, že u ostatních národů stejně naň odpovědí esperantisté. Zdá se, že stále se opakují námitky staré. A přece je tu pokrok! Před šesti lety z téže Akademie do téhož »Figara« napsal hrabě d'Haussouville článek proti esperantu, v němž odsoudil své krajany, kteří prý šířením esperanta podkopávají půdu francouzštině. A dnes pan Prévost nestojí už na stanovisku vlastenecky sobeckém, nýbrž brání se jen důvody osobního prospěchu. Pokrok! Na štěstí vědí esperantisté tolik, že u francouzského národa, který měl vždy vyvinutý smysl pro mezinárodní otázky se vyskytli hned v začátcích hnutí esperantského lidé, kteří bystrou hlavou a upřímným srdcem pochopili význam této řeči a stali se jejími průkopníky. Členové Akademie činí pravý opak.

Ale přistupme k článku!

Nazývá-li pan Prévost učení se esperantu mařením času, dovoluji si na zmírnění tohoto krutého soudu uvésti výrok Tolstojův: »V každém případě je tedy obět; kterou jednotlivec evropskéko světa přináší tím, že trochu času věnuje, aby se esperantu naučil, tak nepatrná, a možné následky (kdyby všichni, aspoň Evropané a Američané, všichni křesťané tomuto jazyku se naučili) tak ohromné, že nelze o to se nepokusiti«. Ale i bez pochval slavných mužů chválí se věc sama. Esperanto je genialní vynález 19. století a studium jeho je požitkem, jenž dává člověku nahlédnouti do logiky a psychologie jazykové a do dílny lidského ducha vůbec. Tedy nikoli maření času, ale zisk.

Tvrzení, že esperanto nezasluhuje názvu řeči světové, je uzavírání očí před skutečností. Esperanto je od svého objevení dorozumívací řečí v plném smyslu slova. A stane se, co pan Prévost popírá, že se mu totiž naucí učenec jen proto, aby poznal některá vědecká neb literární díla v něm

sepsaná, neboť esperantem bylo už napsáno několik děl původních (počet jich roste!), jež sotva kdy budou přeložena do národních jazyků, neboť jsou v lehkém esperantu přístupna celému světu vzdělanému. Okolnost tato často přispívá k jejich láci, což též rozhoduje.

Na důsledky, jež pan Prévost vyvozuje z čísla 500.000, úhrné to sumy esperantistů na celém světě, třeba zvlášť dáti pozor. K číslu onomu poznamenáváme: Nevíme, kolik nás je. Víme jen, že jsme všude. Vždyť počet esperantistů se mění každým dnem — vzrůstaje. A kdyby nás bylo jen tolik! Byl by to důvod k zamítání věci tak krásné a čekání, až se »ti ostatní« přidají. Tolik víme, že je nemožno míti úplné číslo osob esperanta znalých, neboť mnozí, třebas ochotní a výborní esperantisté se nestarají o to, aby byli zapsáni v adressáři, členy spolku aneb odběrateli časopisu. A pevná organisace esperantistů s praktickým cílem je teprve v začátcích trvajíc dvě léta. Dnes sotva možno sledovati vycházející knihy a časopisy.

Za prvé je pan Prévost spokojen s »francouzštinou, jíž se smluví s 50 mil. svých krajanů a ještě snad s 50 mil. cizinců, kteří francouzsky rozumějí a mluvit se učili«. Ve slůvku »snad« je zdravá tucha skutečnosti. Upozorňuji důtklivě pana Prévosta, aby při cestování v cizině příliš nespoléhal, že se smluví s mnohými z těchto 50 milionů, které existují ostatně pouze na papíře. Arci je to číslice příliš svůdně lichotivá a pýcha Francouzů ještě více roste důvěrou v luznou budoucnost, kterou jim kreslí frankofilové jako Novicov, jenž vypočítal, že roku 2000 bude mluviti francouzštinou asi 200 mil. lidí. Proti němu ozvaly se střízlivé hlasy ukazující, jak francouzština stále ztrácí půdu.

Za druhé je pro pana Prévosta výhodnější naučiti se angličtině, jíž prý se i »nejhloupější člověk naučí za tři měsíce«. Ale o tomto smělém tvrzení sám hned pochybuje a zatvrzele praví: »A kdybych i potřeboval šesti měsíců k naučení se angličtině a pouze 14 dní, abych se naučil esperanto, byl bych v prvním případě vždy ve výhodě«. Soudím, že i šest měsíců je málo k povrchní znalosti kteréhokoliv evropského jazyka. A rok stačí snad pro člověka jazykově velmi nadaného a jen jazyku se věnujícího. A výsledek? Myslíme-li při učení se angličtině na světové její rozpětí, nezapomeňme, že výslovnost ostrovní se velice liší od americké. Angličtina je sice rozšířena ve státech přímořských a tu hlavně v městech přístavních, jinde je její znalost malá, hlavně tam, kde se o primát uchází též němčina nebo francouzština. V Rakousku

je znalost angličtiny přímo bídná vinou organisace školství; tak na českých středních školách angličtina není nikde zavedena úředně. (Pokračování.)

APOSTOLO DE LA HUMANECO.

Boheme verkis prof. Dr. *Frant. Krejčí*. El la manuskripto de l'autoro tradukis *H. K. Bouška*.

Ekzistas diversaj problemoj t. n. (= tiel nomataj) nuntempaj, kiuj estas laŭ la objektiva vidmaniero esprimo pri la malkontento kun la nunaj cirkonstancoj kaj laŭ la subjektiva vidmaniero pruvo pri la nedaŭrigebleco de ili... la problemoj sociala, nacia, religia... kaj sole en la solvo de ĉiuj oni povas vidi la garantion pri la pli bona estonto. Ili do estas egale gravaj kaj oni devus solvi ilin samtempe aŭ pli bone dirite oni devus scii, ke ili ĉiuj kune dependas unu de la alia — sed en la realeco oni forgesas tion, oni preterrigardas la interrilaton, kaj el tio rezultas, ke per ilia (oni povas diri unuflanka) solvado naskiĝas konfliktoj malfaciligantaj la progreson de la bona afero, oni kun bedaŭro vidas la progresemajn homojn en kontraŭaj partioj; tiamaniere penante solvi unu problemon ili trovas sin ĉe la reakciuloj pekante kontraŭ la sama principo de la humaneco, kiun ili postulas en la alia problemo. En la intereso pri la bona afero, en la intereso pri la progreso, en la intereso pri la pli bona estonteco de la homaro estas kontraŭstari tion ĉi per la redukto de tiuj ĉi diversaj problemoj al unu.

Tolstoj ekkonis — tio estas karakteriza por li kaj ĝojiga por la homaro — ke la universala problemo, de kies solvo dependas la feliĉo de la homaro kaj en kies solvo estas enhavita jam per si mem la solvo de ĉiuj aliaj problemoj, estas la religia problemo.

La nuna socia krizo estas propre la idea krizo, kiu montriĝas kiel lukto de la malnova religia opiniaro pri la mondo kun la novaj ideoj kondukantaj al la alia opinio pri la mondo, pri la pozicio de la homo en kaj al la socio, pri ĝia tasko en la tuto de la tutmonda agado, kaj per tio al la alia organizo de la socio. Se la nuna organizo devas esti forigita, devas esti forigita ĝia fundamento, la sociaj reformoj antaŭsupozas la reformon en la religia opiniado.

Tial Tolstoj koncentris sian penadon pri la reformo sur la kampon de la religia problemo, propre li estis por siaj penadoj por la feliĉigo de la homaro tie devigita al la plej persista batalo, ĉar ĝuste tie sur tiu ĉi kampo — mi

aludas tion sole ĝenerale — la plej obstinaj antaŭjuĝoj baras la vojon al la pli bona percepto kaj kasta egoismo havas tie la plej efikantan apogon en la malsaĝeco kaj malforteco de homoj.

Tolstoj vidis ĉe si mem kaj li priskribis tion per neimitebla maniero en »Anna Karenina« kaj »Konfeso«, kion signifas por la spirita trankvilo de la homo-individuo la konflikto inter la tradici-religia kredo kaj la prudento, kaj elirante de tio li perceptis kun la certeco de akrovidanto la kaŭzon de la sociaj malĝustaĵoj, per kiuj plej multe suferis la plej malsupraj, al kiuj esti savonto li decidis. Li vidis kaj sentis, ke la religiaj ideoj donas motivon por tia opiniaro pri la mondo, kia tenas la popolon en la materiala kaj intelektuala servutoj je utilo de kelkaj klasoj, li ekkonis, ke la principo de la nuna socia ordo estas m e n s o g o.

Tial li kun la tuta forto de sia potenca spirito stariĝis kontraŭ la mensogantojn, por liberigi sian muĵikon el iliaj kaptiloj per tio, ke li penis montri la mensogon kiel mensogon kaj por estigi la pliboniĝon per la potenco de la vero. De tie devenas lia batalo kontraŭ la ultramontanismo, la batalo, al kiu li dediĉis ĉion, la batalo, en kiu montriĝis lia tuta grandeco, kiel en la maniero de batalado tiel per la rezultatoj. Mi ne povas priskribi la detalaĵojn de tiu batalo, mi ne povas klarigadi, kion kaj kiel Tolstoj per paroloj, skriboj kaj faroj entreprenis por atingi sian celon. Mi kontentiĝas per la konstato, ke la tuta agado en lia dua parto de lia vivo estis plene dediĉita por solvado de la religia problemo kaj mi prezentas la finan formulon de ĝia-solvo, la formulon, kiu estas la plej rimarkinda el ĉio, kio el la grandeco de Tolstoj rezultas por forigo de la malhelpaĵoj sur la vojo al la feliĉo kaj al la efektiviĝo de la idealo de la humaneco.

(Fino.)

L. N. TOLSTOJ KAJ ESPERANTO.

Verkis *Jos. Krumpholc.*

Disvastigadi la veron, propagandi la progreson, justecon, fratecon, amon kaj aliajn noblajn ideojn estas certe ĉiam meritplena, faru tion kiu ajn; sed jam antikva H o r a t i u s diris, ke multe dependas de tio, k i u parolas — ke ne estas la sama, k i u kun ideo simpatias, k i u ĝin propagandas...

Ideo de esperantismo kiel ideo de la frateco, paco kaj u n u i ĝ o de homoj, kiu ideo, laŭ letero de L. N. T o l s t o j

el 20. VI. 1910 al la slava kongreso en Sofia, estas ne sole la plej grava problemo kaj tasko de la homaro, sed ankaŭ la destino kaj celo kaj feliĉo de homa vivo — havas certe jam ĝi mem sufiĉe da interna forto, por ke ĝi gajnu dum daŭro de la tempo, se ne la tutan, do almenaŭ plimulton da homaro kaj per tio fine la tutan mondon — sed ankaŭ pri ĝi, kiel pri ĉio bona, oni povas diri: Ju pli frue, des pli bone.

Do gajni helpon, apogon, simpation de genia, giganta viro, kies grandecon oni povas vidi ĉie en la mondo kaj voĉon aŭdi inter ĉiuj nacioj ankaŭ dum uragano de ondoj de interesoj kaj penoj plej materialismaj, tio signifas almenaŭ tiom, kiom en batalo gajni regantan punkton — intermonton — kaj per tio subite ŝlosilon de la tuta regiono.

Kaj tian »intermonton« trans Himalajmontaro de antaŭjuĝoj gajnis esperanto en L. N. Tolstoj, en la plej granda artisto-verkisto rusa kaj eble tutmonda, en la plej granda apostolo de la humaneco moderna — estonta kaj de ideo pri unuiĝo, amo, justeco kaj frateco de ĉiuj homoj de diversaj deveno, lingvo, religio k. t. p.

Estis en la j. 1888, kiam la 60. jara L. N. Tolstoj konantiĝis pri esperanto ankoraŭ kiel infaneto. Kaj kiel biblia Simeono ekkonis en infaneto Jesuo la Savonton kaj profetis pri li, simile ankaŭ L. N. Tolstoj ekkonis en esperanto ĝian grandan signifon kaj difinon mondan, humanecan kaj aktualan, li ekkonis en ĝi savonton de neinterkonsenteblaj kaj pro tio malamikaj popoloj, eĉ rimedon por akceli, rapidigi la kreon de Dia regno sur la tero, kiu estas laŭ Tolstoj la ĉefa, eĉ la sola destino kaj la plej alta celo de la homara vivo.

Tolstoj skribis pri tio la 27. IV. 1894, kiam kelke da esperantistoj petis lin esprimi lian opinion pri internacia lingvo kaj esperanto.

Li skribis tiam:

»Estimataj sinjoroj! Mi ricevis vian leteron kaj penos, kiom mi povos, plenumi vian deziron, t. e. esprimi mian opinion pri la penso de lingvo tutmonda entute kaj pri tio, kiom la lingvo esperanto respondas al tiu ĉi ideo.

Pri tio, ke la homoj celas al tio, fari unu anaron kun unu paŝtisto de prudento kaj amo kaj ke unu el la plej proksimaj kondukantaj ŝtupoj por tio ĉi devas esti reciproka komprenado de la homoj — pri tio povas ekzisti neniu dubo. Por tio,

ke homoj komprenu unu la alian, estas necese aŭ tio, ke ĉiuj lingvoj per si mem kuniĝu en unu lingvo (kio, se ĝi okazus iam, povus okazi nur post tre longa tempo), aŭ tio, ke la posedo de ĉiuj lingvoj tiel vastiĝu, ke ne sole ĉiuj verkoj estu tradukitaj en ĉiujn lingvojn, sed ankaŭ, ke ĉiuj homoj sciu tiom multe da lingvoj, ke ĉiuj havu la eblon interrilati unu kun la alia en tiu aŭ alia lingvo, aŭ tio, ke ĉiuj elektu unu lingvon, kiun devige lernus ĉiuj popoloj, aŭ fine tio (kiel supozas la volapükistoj kaj esperantistoj), ke ĉiuj homoj de diversaj nacioj akceptu unu artefaritan faciligitan lingvon internacian kaj ĉiuj lernu ĝin. En tio ĉi konsistas la ideo de la esperantistoj. Ŝajnas al mi, ke tiu ĉi lasta supozo estas la plej prudenta kaj — kio estas la plej grava — la plej facile efektivigebla.

Tiel mi respondas la unuan demandon. La alian demandon — en kia grado la lingvo esperanto kontentigas la postulojn pri lingvo internacia — mi ne povas respondi tute konvinke, ĉar mi ne estas kompetenta juĝanto en tio ĉi. Unu, kion mi scias, estas tio, ke volapük aperis por mi tre komplikita, sed esperanto kontraŭe, tre facila, kiel ĝi devas aperi al ĉiu Eŭropa homo. (Mi pensas, ke por tutmondeco en absoluta senco de tiu ĉi vorto, t. e. por ligi inter si Hindojn, Ĥinojn, popolojn Afrikajn k. t. p. estos necesa alia lingvo, sed por homo Eŭropa esperanto estas tre facila). La facileco de ĝia lernado estas tiel granda, ke ricevinte antaŭ ses jaroj esperantan gramatikon, vortaron kaj artikolojn, skribitajn en tiu ĉi lingvo, mi post ne pli ol du horoj de okupado povis jam, se ne skribi, almenaŭ libere legi en tiu ĉi lingvo.

En ĉia okazo la oferoj, kiujn alportos ĉiu homo de nia Eŭropa mondo, dediĉinte kelkan tempon por la lernado de tiu ĉi lingvo, estas tiel malgrandaj, kaj la sekvoj, kiuj povas veni, se ĉiuj — almenaŭ Eŭropanoj kaj Amerikanoj — ĉiuj Kristanoj, estos lernintaj tiun ĉi lingvon, estas tiel grandegaj, ke oni ne povas ne fari tiun ĉi provon. Mi ĉiam pensis, ke ekzistas neniu pli kristana scienco, ol la sciado de lingvoj, tiu

sciado, kiu donas la eblon komunikiĝi kaj ligiĝi kun la plej granda nombro da homoj. Mi vidis multajn fojojn kiel homoj kondutis malamike unuj kontraŭ la aliaj sole pro la meĥanika malhelpo por reciproka komprenado. Kaj tial la lernado de esperanto kaj la vastigado de ĝi estas sendube kristana afero, kiu helpas al la kreado de la Regno de Dio, tiu afero, kiu estas la ĉefa kaj sola difino de la homa vivo. — Lev Tolstoj.«*)

(Daŭrigo).

NAJTINGALO KAJ JUNA POETO.

Verkis *Božena Studničkova.*

Dum bela, maja vespero, kiam la tuta regiono dronis en magia heleco de la luno, juna poeto promenis laŭ arĝentŝaŭmá rivereto randumita per verdaj arbetaĵoj, sur kiuj brilis rozkoloraj, belodoraj floraĵoj.

Jen en denso de l'arbetaĵo sidis najtingalo kaj ĉarme kantis. Ĝia belega kanto ravis kaj kortuŝis la aŭskultantan junan poeton.

»Diru al mi, kara najtingalo, vi sorĉa birdo, kiel okazas, ke via kanto tiel profunde kaj varme kortuŝas nian internon?« demandis sopire la juna entuziasmita poeto.

»Miaj kantoj torente fluas rekte el mia sentoplena animo«, respondis la najtingalo. »Kion mi sentas, kio min ĝojigas, per kio mi suferas, pro kio mi feliĉiĝas aŭ pereas — ĉion ĉi mi esprimas kaj reproduktas en mia kanto. Kontraŭe multaj el vi, poetoj, kantas sole por atingi la gloron. Mia kanto naskiĝas profunde en mia propra varmoplena koro, sed viaj kantoj, kiujn vi artfarite preparas kaj orname plibeligas sopirante esti glorumitaj — eliras sole el via cerbo kaj tial ili ne povas trovi la vojon al la homaj koroj.«

KVAR ANĜELOJ.

El *»Horkého čítanka«* (Legolibro de Horký) tradukis *St. Stejskal.*

Antaŭ nelonge mi promenis tra provinca urbo kaj ekvidis en in strato enterigan veturilon. Ĝi staris antaŭ la forĝejo kaj metilernisto ŝmiris per lako ĝiajn radojn.

*) Esperantisto, V. (15. VII. 1894) pĝ. 99—100.

Mi haltis kaj amuzis min per observado de la knabo, ĉar neniam mi vidis ŝmiri enterigan veturilon. Ĝi prezentas multon novan al vivuloj.

Subite mi rimarkis, ke supre, en ĉiuj kvar anguloj de la veturilo, troviĝas malgrandaj truoj. Scivole mi demandis la lerniston, por kiu celo servas la truoj.

Li surprizis min per sia sciigo, ke en tiujn truojn oni metas en maloftaj okazoj kvar anĝelojn. Danke Dion, mi scias nune ĉion detale. La urbeto havas propran enterigan instituton. Kaj la enterigoj estas dividitaj en tri klasojn. La unua klaso, destinita por la riĉuloj, estas la plej multehosta kaj oni uzas por ĝi enterigan veturilon kun kvar orumitaj anĝeletoj. Malsupra parto de ili havas nome ruleton, kaj kiam mortas la riĉulo, oni prenas la anĝeletojn kaj enigas ĉiun per la ruleto en la truon. Tio estas unuaranga enterigo.

Ho vere, feliĉaj estas la urbetanoj, al kiuj la sorto donis riĉaĵon. La kvar anĝeloj havantaj en malsupra parto la ruletojn veturigos ilin rekte en ĉielon.

Feliĉaj riĉuloj...

Requiem aeternam...

PROBLEMOJ KAJ OPINIOJ.

„Dokumentoj de la progreso" en esperanto? (Sincera averto). »Oni jam planas la eldonadon de la fama revuo »Dokumentoj de la progreso« en esperanto, same la publikigon de epokfara artikolo de nia fama samideano prof. Dr. Forel«. Tiun ĉi sciigon oni disvastigas en la lasta tempo kaj per ĝi oni vekas grandajn esperojn de tiuj, kiuj havas la konscion pri la grandega signifo de la nomita revuo kaj komprenas la signifon de la fakto, ke tia revuo povus eliradi esperante. Ni multege ĝojus, se la entrepreno estus efektivigebla, tamen ni ne kredas tiun ĉi sciigon kaj ni sincere konsilas, ne vekadi nepravajn esperojn; certe neniu serioze planas tiun ĉi entreprenon. Kaj se oni efektive planas ĝin, tiam ni ankoraŭ pli energie konsilas, ne komenci la neefektivigeblan aferon, kies certa malsukceso tre malutilus al nia movado. Ni estu seriozaj kaj prudentaj! Koncerne la publikigon de l'artikolo de prof. Forel, ni ĝin rekomendas tiel sincere, kiel ni malaprobas la intencon (?) eldonadi esperante la nomitan revuon. *Bšk.*

Kiu falsis „Tutmondan jarlibron esperantistan"? »Al s-o H. K. Bouška, redaktoro de »Bohema esperantisto«. Estimata samideano. Tralegante la numeron 3an de la 20a de decembro 1910 de »Bohema esperantisto«, mi vidas sub subskribo H. K. Bouška plendojn pri la Centra oficejo okaze de eraroj montritaj de vi en la lasta eldono de la Tutmonda jarlibro. La Centra oficejo efektive starigis la liston de la esperantistaj societoj kaj grupoj je la fino de la jaro 1909 kaj liveris tiun liston al la redakcio de Tutmonda jarlibro. Por ke ni estu certaj pri la senerareco de tiuj listoj, ni sendis presprovaĵojn de la Jarlibro en ĉiujn landojn, al la sekretarioj de la naciaj societoj petante, ke ili korektu mem tiujn prosprovaĵojn,

kaj resendu al ni poŝte la dokumenton. Ni zorgis enpresi ĉiujn korektojn montritajn al ni tiamaniere, kaj ni povis esperi tiel, ricevi liston kiel eble plej fidindan. Mi do ne povas kompreni, kial en la listo pri Aŭstrio restis tiom da eraroj kaj mankoj, kaj ili eble estis kaŭzitaj de la konfuzo, kiu ekzistas en via lando, kie multaj societoj havas saman celon, preskaŭ saman nomon kaj eĉ sekretariojn kun similaj nomoj. Tiu konfuzo naskis eraron, sed mi ne povas scii, kie kaj de kiu tiu eraro estis farita, ĉu de la poŝto, ĉu de unu el niaj oficistoj? Mi tamen devas protesti kontraŭ via diro, ke tiuj eraroj estis faritaj intence kaj tendence. Nia sola deziro estis ĉiam publikigi liston kiel eble plej plenan kaj korektan kaj neniam ni celis malplaĉi al tiu aŭ alia el la esperantistaj societoj. Se tuj kiam vi rimarkis tiujn erarojn, vi estus skribinta al ni leteron por ilin montri, ni estus volonte enpresintaj korektigan folion, enmetotan en ĉiujn ekzemplerojn de la Jarlibro. Mi multe bedaŭras ke, anstataŭ skribi al ni pri tio, vi preferis kulpigi nin publike, en via gazeto pri partiemo, falsado k. t. p. Ni neniam donis al vi iun motivon, por ke vi povu kredi nin kapablaj je tiuj intencoj. Petante, ke vi bonvolu publikigi tiun leteron en la proksima numero de Bohema esperantisto, ni sendas al vi, estimata sinjoro, nian samideanan saluton. Paris la 30. de dec. 1910. *Gabriel Chavet.*

KRONIKA A KOMENTÁŘ.

Rozmanitosti z esperantistického hnutí. — Městská rada v Antverpách (Belgie) odhlasovala subvenci 3000 fr. VII. mezinárodnímu sjezdu esp. a hodlá i jinak sjezd všemožně podporovati. — V Berlíně v »Museum für Völkerkunde« přednášel prof. Agache z Paříže esperantsky o sociálním umění ve Francii; přednášku (kterou na to v Praze proslovil francouzsky) pořádali místní esp. v dohodě s mezinárodním ústavem pro výměnu pokrokových zkušeností. — Londýnská obchodní komora ve svém cirkuláři o zkouškách v roce 1911 uvádí, jako už po několik let, mezi zkušebnými předměty také esp. — V lidové knihovně v Antverpách (Rue des aveugles) je přes 70 děl esperantských. — Informační kancelář pro cizince v Budapešti (»Cicerone«, Budapest VIII., Uelloi ut. 10) přijala esperanto mezi cizí jazyky kanceláří užívané. — V Chabarovsku (Rus.) kadeti z vojenské školy obdrželi úřední dovolení súčastniti se kursu esp. — Na základě vyhlášky policejního ředitele antverpského (Schmit) přihlásilo se do kursu esp. pro policii 14 polic. úředníků a 116 strážníků. — Papežský nuncius v Bavorsku upozornil německé biskupy na esperanto a zpravil o tom i papeže Pia X. — Na 57. valném shromáždění něm. katolíků (v Augsburku) uspořádali esperantští účastníci (členové »Tutmonda katolika unuiĝo esperantista«) zvláštní svoji schůzi, kde rozhodnuto vydávati »Monatsblätter für katholische Esperantisten«. — V Milbertshofenu (Něm.) zakládací listina, vložená do základního kamene místního kostela, je sepsána v němčině a esperantu. — »L'Aero« obsahuje esp. kroniku o aviatice. — Na Novém Zeelandě založen byl svaz esperantistů (Nacia Zelanda esperantista asocio) s odbočkami ve všech větších městech v zemi; v Invercargillu jsou dokonce dva kluby. — Ve Vladivostoku (Rus.) založen spolek esp., který sdružuje Rusy, Japonce a Číňany. — Že esp. může nadchnouti lidi i vysokého stáří, ukazuje, že členem spolku esp. v Amiens (Francie) jest stařec (Adéodat Lefèvre) téměř stoletý (nar. r. 1812), jistě věkem nejstarší esp. na světě. — Významná a veliká mezinárodní revue »Dokumenty pokroku«, která je vydávána v jazyku anglickém (Progress, Londýn), francouzském (Les documents du progrès, Paris), německém (Dokumente des Fortschritts, Berlin) a ruském

(Zaprosy šisni, Petrohrad), uveřejňuje pravidelné zprávy o esperantu a hnutí esperantistů; věc má pro esperanto obrovský význam proto, že mezi čtenáře této revue patří přední kulturní pracovníci světoví a že za revue stojí veliké světové sdružení ethické. *Kronikář.*

„Dělnická akademie“ a esperanto. Významná vzdělávací instituce české strany sociálně-demokratické »Dělnická akademie« pochopila obrovský význam jednoho snadného neutrálního jazyka dorozumívacího pro příslušníky Internacionály, a věnuje proto nyní pozornost esperantu. Již ve svém věstníku »Dělnická osvěta« několikráte upozornila na esperanto a také mu věnovala místo ve svém vzdělávacím programu. Tak čteme v čísle ze dne 5. května 1910 (IV., 10, 112) článek »Mezinárodní řeč esperanto« od čilého pracovníka na poli socialismu a esperantismu F. J. Chaloupeckého, v čísle z 15. září 1910 (IV., 18, 214) v programu vyučovacích a výchovných kursů »Dělnické akademie v Brně« uvádí se (sub. 8) »kurs pomocného jazyka esperanta«, v čísle z 1. října 1910 (IV., 19, 217) v článku »Nejbližší úkoly Dělnické akademie« vytýká (sub. 9) autor (Chaloupecký) jako nutný obor lidského snažení »sblížení lidstva«, především propagandu jazyka mezinárodního (esperantismu), a v čísle z 1. prosince 1910 (IV., 23, 269) jest dokonce esperantsko-český článeček o úmrtí Tolstojově (F. J. Ch.: Mortis homo eminenta ...). V době pak poslední rozhodla se »Dělnická akademie v Praze«, že založí esperantský odbor. Dne 19. ledna 1911 uveřejnil ústřední orgán strany »Právo lidu« (XX., 19, 5) toto oznámení: »Soudruhům esperantistům! Výbor Dělnické akademie v Praze uznávaje důležitost propagandy pomocné světové řeči mezinárodní mezi socialistickým dělnictvem a maje na mysli, že sjezd Franc. federace knihtiskárenského dělnictva a před tím již Americká federace práce usnesly se na šíření esp. mezi svými příslušníky, svolil rovněž k ustavení esperantského odboru »Dělnické Akademie« v Praze, a žádá soudruhy z Prahy i z venkova, kteří by se o věc zajímali, aby sdělili nezávazně své mínění a adresu koresp. lístkem D. a. v Praze (Hybernská ul., Lidový palác).« »Čes. esp.« poukázal již dvakráte k tomu, že organisace charakteru tak eminentně mezinárodního jako je socialistická Internacionála nemůže přehlédnouti značných výhod, plynoucích z esperanta pro písemní i ústní styk příslušníků tolika národů, a přál si, aby i čeští socialisté-esperantisté následovali svých soudruhů jinonárodních v propagandě esp. ve straně, proto pochopitelně vítáme vřele popud »Dělnické akademie« a přejeme mu plna zdaru; vítáme jej tím vřeleji, že vidíme, jak zdravý rozum razí si cestu přes směšný odpor některých vedoucích veličin. Své čtenáře pak z řad socialistů (všech odstínů) prosíme, aby redaktoru »Čes. esp.« (H. K. Bouška, Smíchov-Celná) sdělili laskavě své adresy, abychom dle toho mohli přispěti k organisaci propagandy. *Bšk.*

Losy s esperantským textem (vedle jiných různojazyčných textů) vydala Loterie »Spolku c. k. pošt. a telegraf. zřízenců pro země koruny České v Praze« ve prospěch vdov a sirotků a zřízení feriálních osad. *Nemo.*

České přednášky o esperantu. Ve Vyškově v prostranném sále hotelu Albrechtova dne 16. X. 1910 přednášel o významu esperanta pan učit. Krumpholc; s přednáškou spojena byla výstavka esp. časopisů, knih, dopisů a pod., vkusně uspořádaná horlivým a krajně obětavým předsedou spolku »Verda stelo« v Ivanovicích, p. Fr. Klvačem; přednášku vyslechlo asi 50 osob. V Ivanovicích na Hané v Besedním domě dne 23. X. 1910 uspořádal spolek esp. »Verda stelo« v Ivanovicích přednášku o významu esp.; přednášel pan učit. Krumpholc; účastenství bylo značné (108 osob, z nichž asi 50 dam); zaslouženou pozornost budila výstavka uspořádaná p. Fr. Klvačem. V Ruzíni u Prahy v hostinci pana Houšky bude v neděli 12. II. 1911 o 3. hod. odp. přednášeti p. H. K. Bouška na thema »Esperanto a jeho význam pro národ český«. *Kronikář.*

Kursy esperanta pro Čechy. V Turnově konal se I. bezplatný kurs esp. v době 13. VII.—30. X. 1910 každou středu večer (8—9 hod.) v Sokolovně; učil p. F. Řádek. V Čes. Skalici učil esp. (od 10. XI. 1910) p. učit. Fr. Balíček. V Bystřici p. Host. zahájen byl 9. I. 1911 již IV. bezplatný kurs esp., jehož účastní se na 20 osob; kurs koná se 2krát týdně; učí p. učit. Krumpholc. V Brně Klub esp. zahájil kurs esperanta 4. X. 1910; kurs konal se v úterý a v pátek ve škole prof. Pokorného. Ve Vyškově zahájen byl kurs esp. 7. XI. 1910; kursu účastnilo se 30 osob; učil p. Fr. Klvač. V Ivanovicích začal kurs esp. 6. XI. 1910; vedl jej předseda místního spolku esp. p. Fr. Klvač za účasti 20 osob. V Hradci Králové zahájil Kroužek esp. 2měsíční kurs dne 11. I. 11; vyučuje se ve stř. a sob. od 8—9 hod. več.; poplatek 4 K; přihlášky přijímá Ed. Koupka, obchodník na Velkém nám. *Kronikář.*

Zábavy českých esperantistů. — *Česká společ. esperantistů v Praze* uspořádala 13. XII. 1910 slavnostní večer na počest narozenin tvůrce esperanta dra Zamenhofa. Poutavý a bohatý program byl výhradně esperantský a byl četnými přítomnými velice příznivě přijat. Pro zajímavost neváháme program toho večera uveřejniti: Prologo, poemo el G. e. (A. Crhova), Festena parolo pri Dro Zamenhof kaj esperantismo (M. Schmidt), La mondo sen amo, meditado (B. Studničkova), La spegulo de l'princino Orhanti (S. Berger), Funebra parolo de s-o Burĝo (M. Krausová), La malfideleco de l' edzo (Dejmek), Du naciaj kantetoj (F. Crhova), Kial ni vivas sole unufoje, fabelo (Vašátko), Miraklo originala poemo (B. Studničkova), Mia penso, poemo de Zamenhof (K. Biskup), Pri virinoj (A. Crhova), Kian profesion mi elektos? (F. Crhova), societaj ludoj en esp. — *Kroužek esperantistů v Červ. Kostelci* uspořádal 28. XII. 10 přátelský večírek na počest slečny Šupichové, která jest přeložena na školu do Prahy. Deset členů kroužku předneslo různé básně, zejména pěkně s pochopením přednesla pi Kejzlarová báseň »La vojo«; slč. Šupichova přednesla pozorně vyslechnutou řeč, která končila výzvou na podporu esp. tisku, zejména »Čes. esp.« a přáním, aby účastníci sešli se na sjezdu rakouských esperantistů v Praze; pak se esperantsky zpívalo. Po odchodu sl. Šupichové ujala se horlivě propagace paní Berta Kejzlarová, takže není obavy, že by odchodem nadšené propagátorky slečny Šupichové propagace v Červeném Kostelci utuchla. — Pražské spolky esperantistů uspořádají 9. března 1911, velikou společnou zábavu v »Národním domě« na Král. Vinohradech; na programu bude také divadlo. *Kronikář.*

Vycházky českých esperantistů. — Pražské spolky esperantistů sdružené ve »Svazu čes. esp.« podnikly 22. I. 11. velice zdařilou společnou vycházku do oblíbeného výletního místa Pražanů Chuchle, kde ve zvláštní místnosti lázeňské restaurace improvisována byla česko-esperantská zábava; jak cesta sama tak i zábava, o níž pečoval p. Berger, nepopiratelně velice osvěžila všechny účastníky (40), značně přispěla k vzájemnému osobnímu seznámení se, k utužení přátelského svazku mezi jednotlivci i spolky a povzbudila mnohého k zdokonalování se v ovládání jazyka; opravdu mile působila srdečná a upřímná intimnost této animované zábavy, z níž bylo viděti, že v naši společnosti vládne duch opravdového esperantismu; to každý cítil a to každého těšilo a to i nám se na tom podniku nejvíce líbilo. — Pražští esperantisté podniknou 2. II. 11. společnou vycházku do Liboce, kde súčastní se 1. val. hromady místního spolku esp. a pak volné zábavy po této schůzi v host. p. Švarce; schůzka v 1/2 3 odp. u pomníku Radeckého. *Kronikář.*

INFORMACE A DOKUMENTY.

Zákonem zavedené vyučování esperantu existuje ve státě Maryland a na ostrově Sámos. V Marylandu (jeden z původních 13 států Usony, t. j. severoamerické unie, v sousedství Washingtonu) povoleno bylo nepovinné vyučování esperantu na veřejných školách marylandských zákonem podepsaným guvernérem tohoto státu (Austin L. Grothers) dne 11. dubna 1910. Na Sámu zavedeno povinné vyučování esp. na všech školách sámosských zákonem (č. 2342, podepsaným vladařem tohoto ostrovního státu (kníže Andras Emm. Kopassis) dne 8. října 1910 (dekr. č. 6762, 20. XI. 1910). *Hkb.*

Oficielní kruhy v Brazílii pro esperanto. Čas. »La Propagandisto« (č. 3.) zaznamenává tyto úspěchy esperanta v Brazilii, jež svědčí o významné přízni oficielních kruhů této republiky k esperantu: Ministr Tavares de Lyra osobně předsedal prvému sjezdu brazilských esp. před 2 lety. Min. Lauro Müller schválil užívání esperanta v telegramech. Min. Miguel Calmon schválil, aby vládní oficielní informační kniha o důležité národní výstavě vydána byla esperantsky. Min. války Hermes de Fonseca (nyní president republiky) a generál Bormann vyslali zvláštní zástupce na sjezdy esp. brazilských a svolili, aby esp bylo zavedeno na vojenské školy. Min. vnitra dal se zastupovati zvláštním zástupcem (Mello Souza) na VI. mezinárodním sjezdu esp. ve Washingtonu a dal se podrobně informovati o průběhu sjezdu a o rozšíření esp. ve světě. Ve schůzi vládní komise pověřené enketou o otázce reformy vychovávacích method při rozpravě o učeni se cizím jazykům jednomyslně přijata byla resoluce (navrhl ji hr. Affonso Colso) schvalující a povzbuzující k zavádění vyučování esp. do všech veřejných škol. Presidenti různých brazilských států bývali přítomni přednáškám o esperantismu. Starostové Souza, Aguiar a Serzedullo Correia zřídili kursy esp. na všech veřejných vzorných školách (učí se tu 400 žáků a žákyň esp.). Na konec dlužno podotknouti, že v Brazili je 25 čilých klubů esp. *Hkb.*

ZPRÁVY SPOLKOVÉ.

Členům jazykového výboru S. č. e. Poněvadž zaslané oběžníky dosud se nevrátily prosím pp. členy, aby jich oběh nezdržovali. Tomu, kdo právě oběžníky má u sebe, byl bych povděčen, aby mi to korr. lístkem oznámil. Nemařte časem! *Bouška.*

Klub esperantistů v Liboci koná první řádnou valnou hromadu 2. II. 11 o 3. hod. odpol. v host. u Švarců. Klub schází se každý 1. a 2. čtvrtek v měsíci. Kromě toho pořádá spolek (od 20. 1. 11) písemný kurs esp.

LIBROJ KAJ GAZETOJ.

Popolaj proverboj en esperanto (*L. L. Zamenhof: Proverbaro esperanta*). La mortinta patro de la kreinto de esperanto, M. F. Samenhof, verkis grandan kvarlingvan frazeologion-proverbaron (en lingvoj rusa, pola, franca, germana) kaj laŭ lia deziro d-ro L. L. Zamenhof tradukis ĝin esperanten. Ĉi tiun esperantan tradukon eldonis la firmo Hachette et Cie kun

la titolo »Proverbaro esperanta«. La libro enhavas 1232 grupojn da proverboj; la proverboj estas numeritaj kaj en la fino de la verko estas alfabeta registro de temoj kun montro de la ciferoj, sub kiuj estas la proverboj traktantaj pri dezirata temo. Tiu ĉi libro estas valora lingva trezorejo de esperanto, en kiu ĉiuj esperantistoj, ĉu komencantoj ĉu progresintoj, trovas amasegon da modelaj frazoj kaj parolturnoj studindaj kaj imitindaj. Kiel ajn oni juĝas pri la proverboj ĝenerale — unuj trograndigas, aliaj malaltigas iliajn valoron kaj signifon (ni mem neniel ŝatas ilian enhavon ne vidante en ili la veran »popolan saĝon«, sed ni vidas en ili bonegan ekzemplon pri la formo por esprimi la propran ideon kaj penson) — tiun ĉi esperantan kolekton oni devas multe ŝati; oni devas ĝin ŝati pro ĝia lingva flanko. Precipe la lernantoj pri esperanto multe profitos el tiu ĉi libro, ĉar en ĝi ili trovos multegon da ĉiutagaj vortoj kaj frazoj praktike uzeblaj kaj uzataj. — Kelkajn proverbojn el tiu ĉi libro ni publikigis en »Pensoj el la libroj« (Boh. esp. jk. IV., kj. 10, pĝ. 159), aliajn ni represos, kiam la loko permesos, en »Raportoj kaj notizoj«. *Bšk.*

Fabeloj de Hauff *(Wilhelm Hauff - J. W. Eggleton: La Karavano).* La libro »La Karavano« enhavas tradukon de ses mirrakontoj el la populara verko »Märchen« (Fabeloj) de la germana verkisto Wilhelm Hauff. Hauff (1802—1827) estas verkisto de fantazioplenaj rakontoj ĉerpitaj grandparte el malnovaj rakontoj kaj fabeloj; li verkis ankaŭ romanojn, sed ĝenerale oni prave pli ŝatas liajn rakontojn kaj fabelojn ol la romanojn, ĉar en ili plej bone montriĝas liaj originaleco, inventemo, sprito, humoro, rakontista lerteco. Tial liaj fabeloj (aperintoj en »Märchenalmanach« 1825—1827) estis kaj estas ofte eldonataj kaj tradukataj; fine ili aperis ankaŭ esperante en »The British Esperantist« kaj nun en tiu ĉi libro, titolita laŭ tio, ke la fabeloj estas rakontataj de komercistoj en karavano ripozanta dum la pasado tra la dezerto. La legado en tiu ĉi bone tradukita libro estas vere agrabla amuzo. *Bšk.*

Poŝkalendaro por esperantistoj *(Prof. dr. Sgf. Lederer: Esperantista poŝkalendaro 1911).* »Esperantista poŝkalendaro 1911« zorge redaktita de la laborema samideano s-o Lederer kaj bele — bedaŭrinde iom malfrue — eldonita de la simpatia Berlin'a librejo estas praktika notizlibro kaj bona informilo, kiu enhavas krom necesa dataro kaj diversaj (laŭ nia opinio ellasindaj) rubrikoj por enskriboj kelkajn memorindajn datojn, esp. himnon, esp. fajfsignalon, esp. porblindulan alfabeton, deklaracion pri esperantismo, priskribon de la nunjara kongresurbo (Antwerpen), internacian montabelon kaj informojn pri »U. e. a.« kaj pri ĉiuj esperantistaj institucioj en la mondo. La listo de asocioj, societoj, grupoj, rondetoj, oficejoj, konsulejoj, delegitoj, gazetoj, hoteloj, restoracioj ktp., zorge kaj diligente redaktita kaj nove reviziita kaj kompostita, faros bonegan servon al ĉiu, kiu celas la interrilatojn kun la fremdularo; ĉi tiu ĉefa parto de la kalendaro klare montras la konstantan progreson kaj kontentigan staton de nia movado; la materialo tiel kreskas, ke eble jam en la venonta jaro la redaktoro devos, por ŝpari la lokon, limigi la informojn pri societoj je sidejo (por vojaĝantaj uzantoj) kaj adreso de unu persono (ordinare sekretario) akceptanta la korespondaĵojn (por korespondantaj uzantoj) anstataŭ nomi tri komitatanojn kiel nun — tiel kreskas nia afero. La posedantoj de la libro, ornamita per portreto de s-o Van der Biest-Andelhof kaj bindita en malmola angla kovrilo, povas partopreni en facila enigma konkurso, en kiu ili povas gajni monajn kaj librajn premiojn (dek tri: 15 Sm, 10 Sm, 5 Sm, 2 Sm, . . .). Al ĉiu, kiu uzas la poŝkalendaron oni povas rekomendi aĉeti ĉi tiun esperantan kalendaron. *Bšk.*

Kompleta vortaro esperanto-franca *(E. Grosjean-Maupin: Dictionnaire complet espéranto-français).* »Dictionnaire complet espéranto-

français« de universitata profesoro s-o Grosjean-Maupin estas negranda, sed tre detala enhavante ĉiujn vortojn troveblajn kaj — netroveblajn en la ĝisnunaj vortaroj kaj esperantaj verkoj. Tre interesesa estas longa antaŭparolo, en kiu la aŭtoro pritraktas la malfacilan problemon pri neologismoj kaj trafe kritikas la opiniojn kiel de la progresemaj tiel de konservemaj esperanto-lingvistoj (kiam la loko permesos, ni konatigos al niaj legantoj liajn opiniojn). La vortaro enhavas multajn neologismojn, multajn (ofte prave, sed pli ofte malprave) nove akceptitajn aŭ ŝan itajn vortojn. Riproĉinde estas, ke en multaj okazoj la vortaro enhavas la proponatan, neuzatan formon, sed ne la uzatan; per tio la vortaro mem pekas kontraŭ la ĝusta principo de l'antaŭparolo, doni en esperanto-nacia vortaro tradukon de ĉiuj, ĉu bonaj ĉu malbonaj, vortoj, troveblaj en la esp. tekstoj; se la aŭtoro por iu vorto proponas novan formon, li devas ankaŭ citi la malnovan: certe estas tre mirinde kaj neaprobinde, se en la kompleta vortaro mankas kelkaj vortoj el »Universala vortaro«, vortoj certe tre uzataj. Senbezone estas, ke la vortaro enhavas multajn vortojn netroveblajn en la esp. tekstoj; tio estas simple neutila, ĉar, se oni ne trovas iun vorton en la tekstoj, oni ne serĉas ĝin en la vortaro. Neaprobinda, ĉar maloportuna por la uzanto, estas »Supplément«, kies vortoj povis esti lokitaj en la vortaro mem kun speciala signo; kiu dum la rapida laborado kontrolus, en kiu parto estas serĉata vorto? Kaj se oni jam tiel dividis la vortaron, oni devis meti en tiun ĉi aldonon multajn el neologismoj de l'vortaro (nam, olim, so, no k. m. a.). Kompreneble neniel povas malutili, se oni havas en la libro pli ol oni bezonas, tial tiu ĉi tre kompleta kaj eleganta vortaro estas praktika helpilo por la personoj sciantaj la francan lingvon. *Hkb.*

Nova sento (III, 19) donas bonan konsilon per jena aforismo: Por solvi esperantajn malfacilaĵojn diskutu malmulte kaj legu multe. *B.*

La Duonmonata (I jaro, 21—22) sciigas, ke ĝi provizore (?) ĉesas eliradi. Bonaj esp. gazetoj ne povas vivi... *B.*

The British Esperantist (VI, 72) rekomendas al ĉiuj esp. societoj imiti la ekzemplon de la Coventry Esperantista grupo, kies komitato decidis, ke la societo aniĝu al »Ĉekbanko esperantista« kaj ke la anoj pagu siajn ŝuldojn per ĝia konto. Multaj estroj kaj anoj de grupoj havas jam kontojn, tamen estus pli bone, ke la societoj mem havu apartajn kontojn, por ke ĉiu ano povu uzi ilin. Tiamaniere post iom da tempo, kiam la ĉekoj trapasos la diversajn naciajn bankojn, ili fariĝos bonega reklamilo por nia movado. En la kroniko ni legas pri ni: »The Bohema esperantisto« (Český esperantista) edited by H. K. Bouška in *classic* and *elegant* esperanto, has just completed its fourth year. Niajn gratulojn!« Kun danko ni registras tiun ĉi ŝatmontron kaj bondeziron de nia bonega kolego. *H.*

Germana esperantisto (VII, 12) raportas (E. Heydweiller: Esp kaj scienco) pri du germanaj filologoj favoraj al esp. Prof. Sommer, en universitato de Rostock, antaŭ nelogne ekzamenis la problemon kaj diris, »se la esperantistoj konservas sian unuecon, estas tre verŝajne, ke ili atingos sian celon.« Prof. Scheffler, en teknika universitato de Dresden, estas konata kiel unu el la fervoraj defendantoj de esp. en Dresden kaj li eĉ instruas pri esp. *H.*

Franca esperantisto (L'espérantiste français). Monata organo de la francaj esperantistoj. Red.: F. de Ménil, Paris (Francujo), Bvd. Magenta 46. Adm.: G. Warnier, Paris, R. Montmartre 15. Jara abonprezo 4 fr. — Franc-esperanta propaganda revuo, kiu enhavas multajn informajn artikolojn kaj raportojn pri esperanto, sciigojn de la francaj societoj esperantistaj kaj esperantajn aŭ dulingvajn tekstojn pri

diversaj temoj. — En la ricevita numero (III, 1) estas esp. artikolo »Pri siluetoj« (kun ilustraĵoj) kaj franc.-esp. art. »La hundo de Brisquet« (ilustrita). Rimarkinda estas la rubriko kolektanta la dirojn de eminentaj homoj pri esperanto. *H.*

Belga esperantisto (III, 3) pensas (R. Untermann: Pri alfabetoj), ke ne ekzistas lingvo, en kiu ĉiu litero havas sole unu sonon kaj ĉiu sono sole unu literon. Ni scias pri tia lingvo: ĝi estas la bohema, kiu estas tiel fonetika kiel esperanto escepte la literon kaj sonon ch = ĥ. *H.*

Finna esperantisto (IV, 3—6) analizas (J. N.: Pri la nomo de nia lando) diversajn formojn de la nomoj donataj al iliaj nacio kaj lando kaj konklude akceptas kaj rekomendas la formojn: Finnlando, Finno, finna (kun du n). La deziron uzadi tiujn ĉi formojn oni devas respekti. *H.*

Filipina esperantisto ĉesis eliradi. *H.*

Internacia medicino. Oficiala organo de la *Tutmonda esperanta kuracista asocio.* Red. & adm.: Kötzschenbroda-Dresden, Germanujo, Jarabono Sm 3·— (senpaga por Teka-anoj), — Tiu ĉi nova scienca revuo redaktata de prof. dr. H. Dor kaj senpage sendata al la membroj de »T. e. k. a.« estas jam la dua eliranta medicina kaj kuracista organo en esperanto; laŭ tio oni devas juĝi, ke nia afero forte kreskas inter la kuracistaro. Se estas tiel, certe la ambaŭ revuoj prosperos. Ni varme deziras tion al ili. La novan revuon eldonas la sama eldonanto (dr. Talwitzer), kiu eldonas la revuojn »Internacia scienca revuo« kaj »Anti-alkoholisto internacia«. *B.*

Internacia stenografia gazeto „Gabelsberger". Organo de la *Internacia stenografia ligo »Gabelsberger»* Red.: dr. Schramm, Dresden 20, Germanujo. Adm.: Ref. Blauert Dresden-Ständehaus, Germanujo. Jarabono Sm . . . — Por esperanta stenografio oni jam aplikis kelkajn stenografiajn sistemojn, S-o dr. Schramm kreis la esp. stenografion laŭ la sistemo de Gabelsberger; li verkis la lernolibron (eld. Heckner, Wolfenbüttel) kaj nun redaktas ankaŭ la gazeton dediĉitan al la esp. Gabelsberger'a stenografio. Eleganta 8paĝa revueto kun 4paĝa »Stenografia aldono» certe ĝojigos ĉiujn Gabelsbergeranojn. *B.*

Fervoja esperantisto. Organo de *Internacia asocio de la esperantistaj fervojistoj* Red.: So Bontemps, staciestro, Parennes (Sarthe), Francujo. Adm.: Presa societo, Paris (Francujo), rue Lacépède 33. Jara abono Sm 1·—. — Dumonata asocia bulteno de fervojistoj. — La 1-a n-o raportas pri la kunvenoj de »I. a. e. f.« en Barcelona (1909) kaj en Kopenhagen (1910). *B.*

Le Monde espérantiste. Revue mensuelle. Red. & Adm.: Paris (Francujo), R. Sophie-Germain 3. Jara abonprezo Sm. 0.80 — Tiu ĉi monata, franc-esperanta, tre malmultekosta propaganda revuo por franclingvanoj enhavas propagandajn kaj instruajn tekstojn pri esp., literaturajn artikolojn en esp., oficialajn raportojn de la francaj societoj ktp. La revuo ne timas la kritikon kaj polemikon: ĝi akre kritikas la farojn de la ĉefuloj inter esperantistoj, ĝi forte batalas kontraŭ monopoligado de esperanto kaj ĝi pasiplene defendas la netuŝeblecon de esp. kontraŭ reformemuloj. — En la lasta (tria) jarkolekto estis interesaj esp. artikoloj: Sanskrito kaj esperanto, Laboro kaj ŝparo, Pri aerventurado, La mumio de la reĝo Tabinit, La frostita rozo, Pri memorkapableco k. a. La francaj artikoloj estas grandparte »dediĉitaj« al idismo kaj al s-o Bourlet kun lia amikaro. Kelkafoje estas citita en la jarkolekto nia revuo; en la rubriko »Chez nos confrères«, kie oni represas la plej bonan artikolon aperintan en la lasta monato, estas fragmento el nia artikolo »Antisemitismo kaj progreso« (k. 6 p. 92.). Aliaj citaĵoj el nia revuo estas en la rubriko »Tra la gazetaro« (4, 59; 13, 296). *H.*

La Instruanto. Ĉiumonata organo por lernantoj de esperanto. Red. & adm.: Möller & Borel, Berlin SW 68, Lindenstr. 18—19. Jara abonprezo 1 Sm. — Okpaĝa german-esperanta gazeto por esperantistoj-komencantoj, kiuj trovas tie diversajn facilajn kaj mallongajn modelojn tekstojn, ordinare dulingvajn. Tial la gazeto taŭgas ankaŭ por alinaciaj esperantistoj lernantaj germanan lingvon. *H.*

La Dek-sepa. Red. & adm.: Paris (Francujo), Bvd. Percire 179 (H. de Coppet). Jara abonprezo Sm 0·40. — Monata bulteno de la sekcio en XVII. distrikto de esperantista grupo en Paris; ĝi estas senpage disdonata al la sekcianoj. *H.*

Ricevitaj verkoj (la steleto* montras la verkojn, pri kiuj ni raportas aŭ raportos). — *1911 Esperantista poŝkalendaro.* Red. de prof. dr. Sgfr. Lederer. Berlin, Möller & Borel; pĝ. 192, prezo Sm 0·50(*. — *Per espero al despero.* Dek poemoj de Dro Stanislav Schulhof. Eldonis MUDr. St. Schulhof en Pardubice (Bohemujo) 1911; pĝ. 30, prezo Sm 0·25(*). — Esperanta biblioteko internacia 14-15. *Amoro kaj Psiĥe* de Lucius Apulejus. Tradukis el la latina originalo Emilo Pfeffer. Berlin, Möller & Borel. Prezo Sm 0·20; pĝ. 62(*). — *Du noveloj el Maŭro Jókai.* El la hungara lingvo tradukis Johano de Luczenbacher. Paris 1911. Presa esp. societo. Prezo fr. 1·25; pĝ. 93(*). — *Sonĝo de Scipio* (Somnium Scipionis). Laŭ la latina originalo de Marko Tullio Cicero esperantisita de Hj. J. Runebeberg. Helsingforso 1910. Ilarejo esperantista; pĝ. 22, prezo Sm. 0·10(*). *Rd.*

Ricevitaj gazetoj. — *Oficiala gazeto esperantista* (III, 6): Regularo pri verkoj rekompencotaj de la Akademio. — *La Revuo* (V, 5): El la antaŭparolo al la »Dictionnaire complet français-esperanto«. — *Lingvo internacia* (XV, 12): Pliboniganta manio. — *Esperanto* (VI, 91): Internacia ligo de l'pura nutraĵo. — *La Duonmonata* (I, 21—22). — *Danubo* (I, 2, 3): Laŭroj (Kuprin). El »La saĝo kaj sorto« (Maeterlinck). Malnova kutimo (el »Vánoce« de Gustav Jaroš trad. H. K. Bouška). — *La Simbolo* (II. 10): La venko de la modernismo. — *Nova sento* (II, 18, 19). — *La Esperantisto* (II, 12). — *La Marto* (I, 2). — *Internacia socia revuo* (V, 1): Usono—lando de libereco? — *Internacia pedagogia revuo* (I, 4). — *Voĉo de kuracistoj* (IV, 1): Pri mortpuno (dr. Šípek). Sunlumizo kaj mortalitato. — *Internacia medicino* (I, 1): Videbla parolo por surd-mutuloj. Ernst v. Leyden. H. Dunant. Salvarsan. Kiom kostas modernaj mondvojaĝoj? La alkoholproblemo. — *Gabelsberger* (I, 1). — *Fervoja esperantisto* (I, 1). — *La Informanto* (prospekto). — *Juna esperantisto* (VIII, 12; IX, 1). — *La Spiritulo* (III, 4, 5). — *La Barbiro* (II, 2—3). — *La Laborista esperantisto* (I, 4). — *Juneco* (II, 2). — *The British Esperantist* (VI, 72, 73). — *Germana esperantisto* (VIII, 1): Eine kleine idistische Fälschung. — *La Instruanto* (V, 1). — *Germana esperanto-gazeto* (III, 23, 24): E. problemo definitive solvita. — *Informaj raportoj* (IV, 12): Malpli multe estus pli bone! Internacia lingvo-oficejo en Bern? — *Rund um die Welt* (II. 1); E. u. d. Kaufmann — *Eĥo esperantista* (V, 55). — *Norvega esperantisto* (V, 2). — *La Holanda pioniro* (III, 3, 4). — *Sveda esperantisto* (I, 9, 10): Kion diris prof. Ostwald. — *Franca esperantisto* (III, 1). — *Le Monde espérantiste* (I, 1; II, 2—12, III, 1—7). — *Belga esperantisto* (III, 2, 3) — *Itala esperantisto* (I, 2). — *Paris-esperanto* (V, 43). — *Sarta stelo* (III, 28). — *La Dek-sepa.* — *Kroata esperantisto* (II, 5—8, 9—12): 10 ordonoj de Komenský (el »Č. e.«). — *Ondo de esperanto* (II, 11). — *La Verda standardo* (III, 10—11). — *Finna esperantisto* (IV, 3—6). — *Greklingva esperantisto* (II, 10): Dekreto Nro 676. — *Brazila esperanto* (III, 5—6). — *La Du steloj* (III, 5—5, 7—8). *Samideano ĉiumonata* (II, 3—4). *Rd.*

Zodpovědný redaktor H. K. Bouška. — Nakladatel Jan Iglauer. — Tisk »Politiky« v Praze.